Februaro Marto 1952 N ro 413 Jarkolekto 49

# ESPERO KATOLIKA

Oficiala monata organo de la Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (I.K.U.E.) fondita de Abbé Richardson en 1910 en Parizo.

Redakcio kaj Administracio Espero Katolika VLEUTEN (Utrecht) Nederlando

Kunlaborantoj d ro E J Görlich(Aŭstrujo) Robert Ernst sac (Belgujo) Ludwig Thalmaier sac (Germanujo) J Vernoux sac (Francujo) Eusebio Maynar (Hispanujo) Prof H G Wannemakers S J (Indonezio) G Ellerman kaj d ro W J A Manders (Nederlando) d ro W Solzbacher (Usono)

## XXXVa INTERNACIA EŬKARISTIA KONGRESO
## Barcelona 27 majo ĝis 1 junio 1952

Ĉar la loĝebleco en Barcelona preskaŭ elĉerpiĝis kaŭze de la multnombraj jam rezervitaj ĉambroj, la kongresanoj estas ege petataj serĉi kontakton kun la landaj grupoj de pilgrimantoj

1 La grupo devas havi la aprobon de la landa komitato de la Eŭkaristiaj kongresoj aŭ de la episkopo de la loka eparkio
2 La grupo nepre devas esti reprezentata de vojaĝagentejo kiu havas sian reprezentanton en Hispanujo
3 La vojaĝagentejo devas rezervi la lokon kaj pagi fiksitan depagon de
 300 pesetas por tipo A
 100 pesetas por tipo B
 50 pesetas por tipo C
4 Kompleta pensiono por 10 tagoj kostas tipo A 3600 pesetas
 tipo B 2550 pesetas
 tipo C 1550 pesetas

Por tiuj 10 tagoj la pensiono estas tute kompleta, inkluzive de la takso kaj trinkmono Se tamen la 10 tagoj ne estas komplete uzataj oni ne rajtas malaltigi la sumon

La esperantistoj kiuj deziras partopreni kaj ĉeesti la E E M (Eŭkaristiaj Esperanto Mondkunvenoj) sin anoncu ĉe f ino Maria Jung Avda Jose Antonio 470 Barcelona, Hispanujo

Tuj antaŭ la kongreso ili ricevos se eble informojn kaj programon de la kunvenoj kaj ejoj por la esperantistoj

La esperantistoj prefere vojaĝu kun la landaj grupoj de aliaj pligrimantoj Po lando ili restu tamen kune dum la vojaĝo

Por la komitato de E E M

M Jung

A Beckers prez. de I K U E

# ĈU LA MONDHISTORIO HAVAS SENCON?

de

**Maksimilian Maria Mielert**

Ĉu stranga demando? Tamen ekzistas ankoraŭ multaj homoj kiuj plene neas ĉiun sencon en la mondhistorio Do ni esploru ĝin iomete por trovi ĝustan kaj kontentigan respondon

Antaŭ ĉio Kiuj estas la aktoroj de la grandioza spektaklo, nomita mondhistorio? Naivulo rapide respondus Nu, kompreneble la homaro Ĉu vere nur la homoj? Dum la Nazi -epoko Hitler kredigis Estas la viroj kiuj faras la historion! (Germanlingve Männer machen Geschichte! ) Tiu aksiomo karakterizas la fatalan historieraron de Hitler kiu ne nur neis la 'ofte decidan kunefikon de la virinoj en la historio sed ankaŭ la grandegan influon kies kaŭzo estas Dio La vivantoj ekkonu ke la Plejaltulo regas en la regno de la homoj! (Danielo) Sed ĉu Dio per tio ne nuligas la homan liberan volon? Nepre ne! Ja estos por ni vivantoj ĉiam granda mistero la reciprokeco inter ambaŭ potencoj sed restas prava kion la Sankta Biblio diras Dio direktas la homkorojn kvazaŭ ili estus akvoriveretoj Do ni devas konstati Estas Dio mem kiu regas la mondhistorion kaj Li povas postuli plenan agnoskon MI estas la SINJORO via DIO! Vi ne havu aliajn diojn krom MI!

Per tio ni jam tuŝis la radikon de la mondhistorio Ĝuste ĉ a r la homo ricevis de Dio liberan volon li povas agi laŭ la mandatoj de Dio aŭ ne!

Kaj jen la enhavo de la mondhistorio ĉar terura kaj timiga estas tiu libereco kaj de ĝi dependas aŭ dumteraj feliĉo aŭ malfeliĉo kaj fine eternaj feliĉego aŭ malfeliĉego! Kaj tre fatala, sensenca estas la eraro de tiuj historiistoj kiuj komencis kiel unuaj disigi la Dian savhistorion kaj la tiel nomitan profanhistorion! Ja ne ekzistas tiu profanhistorio ĉar kiu asertas la kontraŭon neas ne nur la efikon de Dio sed ankaŭ tiun de la Dipatrino Dispremantino de la serpenta kapo kaj Venkintino en ĉiuj bataloj de Dio kaj konsekvence ankaŭ la mizerokaŭzigan influon de la terura kontraŭludisto ĉar la mondvasta temo de la mondhistorio komenciĝis per la Diaj kolervortoj Malamikecon Mi volas starigi inter vi kaj la Virino! Ŝi dispremos vian kapon kaj vi insidos al ŝia kalkano! Kiu estas tiu kalkano ? Kalkano certe estas la plej 'premata parto de la homa korpo do ŝajne tre malmultsignifa objekto Sed provu nur iri sen kalkano! Tiel la kalkano certe signifas la humilajn Marianajn homojn kiuj reflektas la humilecon de Maria, la Plejpotenco sur la genuoj! Kaj se la mondumo ne komprenas tiujn supernaturajn interrilatojn, tamen ni katolikoj devas koncepti ilin alie ni ne komprenas la signojn de la tempo !

Aŭ ĉu tiu ĉi ekkono estas tro simpla por certaj scienculoj? Efektive! Kiel okdekkvarjara maljunulo la fama naturesploranto Aleksandro de Humboldt skribis La tuta vivo estas la plej granda sensencaĵo! Se mi almenaŭ scius, pro kio mi ekzistas! Sed estas kaj restos enigmo al la pensulo kaj la plej granda feliĉo do estas esti naskita kiel idioto! Do plenplena nihilismo! Jen la finrezultato de la vivo kaj laboroj de tiu nekredulo kiu tute ne povis ekkoni ian sencon en la mondhistorio Simile la filosofo Schopenhaŭer konfesis Kiel celon de nia vivo ni efektive nur povas konstati, ke estus pli bone por ni se ni ne ekzistus! Kaj alia eminentulo sur la kampo scienca, la granda Aristoteleso devis konfesi ja simile tamen multe pli kortuŝante sur la mortlito De kie mi venas kien mi iros mi ne scias ĝin En necerteco mi vivis, en necerteco mi mortas! Sed kvankam idolano li daŭrigas mortante 'Ho, Estaĵo super ĉiuj estaĵoj kompatu min!

Certe A de Humboldt ofte staris antaŭ formikejo observante la ŝajne sensencan faradon de la formikoj sed li ja bone sciis klarigi la tre prudentan agadon de tiuj inteligentaj insektoj Nu kial do li kaj multaj aliaj staras antaŭ la grandioza 'homformikejo observante la venon, faradon, foriron de gentoj kaj popoloj, estigon kaj pereon tamen nekomprenante kaŭzojn kaj motivojn?

Nur en la Sankta Biblio oni trovas la ŝlosilon de la vivenigmoj por kompreni la jarmilojn de la mondhistorio! Nur ĝi montras la verecon pri la estigo de l homo pri liaj celoj kaj destino kaj pri la praokazintaĵoj Dio unue sola, volis krei la mondon de la spiritoj, la anĝelojn donante al ili indan taskon

por meriti eternan feliĉon, ĉar Li ja estis doninta al ili mirindan prudenton kaj fortegan liberan volon. En kio konsistis tiu tasko? Ni ne scias ĝin, tamen eklezidoktoroj per la lumo de la Sankta Spirito klarigis ĝin al ni Temis pri la redempto de la pekontaj homoj En ĉiela vizio Dio montris al la anĝeloj, ke Li kreos homojn, kiuj ankaŭ havos prudenton kaj liberan volon, sed ne tiel grandan kaj fortan ke ili bedaŭrinde ne plenumos la donitan taskon, ke Li tamen sendos al ili Savinton ĝuste pro ilia malforteco ke tiu Savinto estante eterna Dio fariĝos homo, naskita el virgulino ke tiu Dihomo poste supreniros ĉielen, kie Li regados kiel eterna Reĝo kune kun tiu Virgulino la estonta Reĝino, super ĉiuj anĝeloj kaj estontaj homoj Dihomo? Homo reĝino super ĉiuj anĝeloj? Tio estis neakceptebla pro la fiereco de la plej potenca anĝelo Lucifero. Ni konas la finon. Ek de tiam ekzistas la infero kun nenombreblaj diabloj, ekzistas la diablo kiel terura kontraŭludisto en la mondhistorio. Kaj ni bone atentu pri la eksterordinara ruzo de l'satano kiu pretekstas al la homoj ke li ja tute ne ekzistas, kiel ankaŭ Goethe lasas diri Mefistofolon en la dramo Faŭst: 'La diablon la homoj ja ekkonas neniam, eĉ ne, se ili jam baraktas en liaj manoj! Kaj ek de tiam estiĝis la plej grava, la plej decida la <u>ĉefdemando</u> por la paso de la mondhistorio

**Kion vi opinias pri la de Dio promesita Savinto Jezuo Kristo?**

Estis jam la decida demando por Kajno kaj Abelo Ambaŭ kredas je Dio, ambaŭ oferas al Li Tamen nur la ofero de Abelo plaĉis al Dio Kial? Ĉar Kajno ja kredas je Dio sed ne je la Dia Savinto La envio kaj obstineco de Kajno kaŭzas la unuan fratmortigon. Adamo kaj Evo ricevas anstataŭulon, la filon Seth, kaj la homaro komenciĝas disigi Jen la Kristkredantoj, jen la Kristneantoj Rezulto: La homoj tiel malboniĝas, ke Dio decidas ekstermi ilin krom Noe kaj lia familio. Sed poste ankaŭ la Noea idaro tiel malboniĝas, ke Dio disigas la homojn. Ĉesas la ĝisnuna pralingvo. Estiĝas la diverslingveco, la ĝermo por la neceseco de l'estonta Esperanto!

La elekto de Abrahamo nur estas komprenebla laŭ la vidpunkto Elekto pro la vera Kristkredo ĉar Abrahamo ja devas fariĝi prapatro de popolo, elektita de Dio nur pro tio, ke ĝi konservu la kredon al la vera Dio kaj al la granda mistera paradizpromeso ĉar el la idaro de Abrahamo devis elveni la Savinto. Sekvas la mirinda eduko de tiu popolo. Dio sendas ĝin al Egiptujo, por ke ĝi lernu diversajn artojn de tiu altinteligenta idolana popolo. Por ke Moseo fariĝu gvidanto de la Dia popolo Dio zorgas ke li estas edukata ĉe la reĝa korto mem Kaj kiam la popolo reposedas la Sanktan Landon, Dio jen rekompencas, jen punas ĝin laŭ la kondiĉo ĉu ĝi kredas kaj obeas al la mandatoj de Dio aŭ ne! Ĉu la mondhistorio havas sencon? Poste la popolo disiĝas en du regnoj Israelo rezignas pri la komuna Templo do ankaŭ pri la antaŭdiroj Mesiaj. Ni ne miru, ke ĝi pereas Plenumiĝas la antaŭdiro de Jakobo: Efektive la regno Judao perdas la sceptron. La tempo estas matura. La Mesio povas aperi!

Sed pro kio la tempo fariĝas matura? Sole pro tio, ke la romanoj plenumis sian taskon, spite al tio, ke ili mem agis senkonscie, konante nek la volon nek la intencon de Dio: Krei potencan mondregnon kun mondtrafiko, kun grandega stratreto ĉie parolita kaj komprenita mondlingvo, kun ordo kaj relative longdaŭra pactempo. Oni pripensu Kiel alimaniere la kristaneco estus evoluiĝinta cent jarojn pli frue aŭ pli malfrue? Nur n u n la kondiĉoj por la evoluo de la Kristregno estis tiel favoraj ol neniam ĝis nun. Ĉu senco en la mondhistorio?

Do la Mesio aperas kaj laŭvice diversaj popoloj estas demandataj de Dio

**Kion vi opinias pri la Savinto Jezuo Kristo?**

Nature unue la juda popolo devas respondi Sed ho ve! La judoj ne ekkonas Tiun, Kiun estis antaŭdirintaj tiom da profetoj eĉ laŭ la plej malgrandaj detaloj! Sekvis la plej terura peko de la mondhistorio La murdo de la Mesio! Devis sekvi same terura respondo de Dio post la blasfema ekkrio juda: 'Lia Sango estu sur ni kaj sur niaj infanoj! Kiel ofte en la mondhistorio plej terure en niaj tagoj plenumiĝis tiu fatala memanatemo! Ĉu senco aŭ ne? Tiel la juda popolo fariĝis malaprobita popolo Sed kvankam ĝi estis farinta la plej teruran pekon de la mondhistorio Dio ne ekstermis ĝin kiel multajn

aliajn pli grandajn fortajn popolojn! Kial do? Ĉar Dio volas ke la judoj antaŭ la mondfino revenu al la S-ta Lando por finfine ekkoni Kiun ili tiam murdis kaj por ke ili fine pentu kaj kantu Hosana al la filo de Davido ! kiel jam antaŭdiris la profetoj Kaj ni ja povas konstati, ke tiu Dia volo komenciĝas plenumi antaŭ niaj okuloj! Ĉu senco? Kaj se Humboldt Schopenhaŭer Voltaire kaj multaj aliaj ne volas ekkoni la sencon en la mondhistorio tiu oficiro el la rondo de la prusa reĝo Frederiko la Dua ekkonis ĝin per sia respondo kiam la reĝo postulis Kiu el vi sinjoroj povas doni al mi la plej mallongan pruvon por la vereco de la Krista instruo? Jen la klasika respondo Reĝa moŝto la judoj! Kaj ĝuste kiel Jezuo estis antaŭdirinta ĝin plenumiĝis la justa puno por la judoj Jeruzalemo estas detruata la popolo disigata,sed la judoj vivas plu Ili ne povas perei! Ĉu senco?

La dua popolo kiu devis respondi estis la grekoj Ili ja parte akceptas la savon dank'al la heroa laboro de la S ta Paŭlo sed parte rifuzas kiel en Ateno kaj poste ili grandparte disiĝas de la vera ŝafejo ĝis hodiaŭ!Sed por longaj jaroj ili fariĝas rabaĵo de la islamo! Ĉu senco?

La tria popolo estas la romanoj Sed ankaŭ ili kiel la judoj krucumas Kriston persekutante la kristanojn plej kruele dum preskaŭ 300 jaroj Jen en la areno la mizeraj sed fine triumfantaj viktimoj de la imperiestra frenezo kaj jen en la imperiestra loĝio tiuj Nero Decius Diokletiano kaj aliaj kiuj igis sin mem dioj Kaj la juĝo de la mondhistorio? La roma regno pereis en la epoko de la popolmigrado kaj tre multaj romanaj imperiestroj finis per murdo aŭ sinmurdo Kaj ĝuste dum la tempo kiam Diokletiano jam estis stampiginta monerojn kun la surskribo Post la ekstermo de la kristaneco! batis la horo por la libereco per la mirakla venko de Konstantino kaj ĝuste tiu Diokletiano devis ankoraŭ vidi tiun tagon! Ĉu senco en la mondhistorio?

Estas nun la vico de la germanoj respondi la ĉefdemandon Ili akceptis la kristanecon ekokupante la romanan regnon sed en la hereza formo de la Arianismo kiu neis la Diecon de Jezuo Ŝajne nun la mondo fariĝis Ariana Sed post la popolmigrado la mondo portas katolikan vizaĝon Kiel tio povis okazi? La triboj herezaj la orientgotoj kaj vandaloj pereis kaj la aliaj triboj germanaj fariĝis Romkatolikoj prefere pro la saĝa influo de katolikaj germanaj princinoj! Cherchez la femme! (T e, jen la influo de la virino!) Iam Petro estis konfesinta sian kredon al la Dieco de Kristo en la nomo de ĉiuj aliaj apostoloj Same nun la frankoj, germana tribo kiu ĝis nun neniam fariĝis apostata kvazaŭ en la nomo de ĉiuj aliaj germanaj triboj respondis la ĉefdemandon skribante en sia popola leĝlibro la famajn vortojn Vivu Jezuo kiu amas la frankojn! Li protektu nian regnon lumigu nian estron per la lumo de la graco ŝirmu nian armeon kaj donu la ĝojojn de l paco kaj tempon de l feliĉo kiel garantiaĵojn de la kredo La Sinjoro de la armeoj bonfavore donu pian sencon Tion skribis kaj deziris popolo kiu forigis la pezan jugon de la romanoj kaj post ekkono de la vera kredo akceptis la bapton kaj en Romo per juvelŝtonoj kaj oro ornamis la korpojn de la S-taj martiroj kiujn la romanoj estis brulintaj kripligintaj aŭ liverintaj al sovaĝaj bestoj! Kaj la respondo de la mondhistorio?

Ĝi igis la frankojn anstataŭuloj de la romanoj donante al ili la mondregecon Sekve pli poste devis ekesti la Sankta Romana Regno de la germana Nacio! Kaj la germana historio fariĝis Kristhistorio dum kelkaj jarcentoj!Ĉu senco?

daŭrigota.

## OKAZE DE MIA EKSIĜO KIEL ĈEFREDAKTORO

Multokupiteco familia kaj profesia malebligas al mi garantii glatan iradon de la aferoj rilate la redaktadon de Espero Katolika Pro tio mi decidis meti mian funkcion je dispono de la ĉefestraro de I.K.U.E.


Mi dankas ĉiujn speciale la regulajn kunlaborantojn , kiuj en la pasinteco bonvole helpis al mi kaj fidas, ke ili restos fidelaj al la nova ĉefredaktoro.

Al li mi deziras sukcesplenan laboron en la intereso de nia movado!

A.F.Leideritz

# ELMIGRADO

(resumo de la parolado de s-ro L.de Jong,dum nia 23-a en München,Aŭgusto 1951a)



*13 Dec° 1642 la nederlandans Abel Tasman atingis la insulojn de Nov Zelando*

Elmigrado estas la socia kazo ke privataj personoj forlasas la gepatran landon por elekti en alia lando kun la celo tie konstrui novan hejmon, kiun oni faros per la laboro Tiu nova hejmo estos daŭra.
Migrado estas internacia afero en preskaŭ la tuta mondo, sed speciale oni parolas pri ĝi kiam rilatas migradon el Eŭropaj landoj, Hindujo, Ĉinujo kaj Japanujo al la novaj teritorioj de Nord kaj Sud Ameriko Aŭstralio kaj Nov Zelando
Ĉar la afero havas du flankojn, nome tiun de la elsendanta lando kaj tiun de la akceptanta lando En la modernaj ŝtatoj la migradaj aferoj estas en interŝtataj kontraktoj, regulitaj.
La landoj el kiuj oni nuntempe elmigras estas en Eŭropo Italujo, Okcidenta Germanujo Nederlando Aŭstrujo kaj rifuĝintoj el Orienta kaj Meza Eŭropo (tiel) nomitaj dislokigitaj personoj,D.P.)Inter tiuj el migrantoj la plej granda parto estas katolikoj Rilate la religipraktikon ktp.sin prezentas do gravaj problemoj
Tial la diversaj katolikaj instancoj,kiuj en la diversaj landoj okupiĝas en la migradaj aferoj, kunvenis en Majo 1951a en Romo por pridiskuti la solvon de tiaj problemoj Kaj oni decidis malfermi centran oficejon en Genève, (vidu malsupren)
Dum tiu konferenco oni ege miris pri la fakto ke el Nederlando tiom da elmigrantoj iras al la supre nomitaj novaj teritorioj Generale oni opiniis tion ne necesa por lando kiu estas tiel ŝtonriĉa. (Certe opinio kiu datumas de antaŭ la lasta mondmilito) Kaj vere la elmigrado dum la lastaj jarcentoj kaj ankau nuntempe okazas ofte pro mizero en la gepatra lando. Mizero kiu ekestas pro diversaj kialoj, k.e. malriĉeco avanturemo malpaco kun la gepatroj prosekuto pro la religio ekonomia fiasko ktp.
Tiuj kialoj certe ne validas por preskaŭ ĉiuj nederlandaj elmigrantoj. Por Nederlando preskaŭ nur validas la kaŭzo, ke ĝi estas tro popoligita, ĝi estas la lando kun la plej densa popolo en Eŭropo (pli ol 300 je kv.km, kaj en la okcidentaj partoj pli ol 750/kv km).
En Nederlando la agraria parto de la popolo ne povas plu akiri grundojn kaj estas tro da laboristoj por la industrio. Tial ofte sufiĉe riĉaj personoj elmigras por certigi al siaj infanoj bonstaton en la estonto
Antaŭ la mondmilito oni pakis siajn kofrojn, klopodis akiri enirpermeson kaj forlasis la patrujon.
Nun la cirkonstancoj tute ŝanĝiĝis.
Oni devas prepari sin por havi sukceson en la nova hejmo.
Oni devas pripensi la aferon, kiu decidas pri la feliĉo de la infanoj kaj eble de la neparo.
Kiuj ne devas elmigri?
1e. Tiuj kiuj havas tre malgrandajn infanojn. Ĉar tiam la patro devos tro longe sole perlabori la vivrimedojn La praktiko pruvas ke tio ne estas ebla.
2e Junaj unuopaj personoj, ekz. ĝis la 21a jaro Ili ofte alvenos en cirkonstancoj kun gravaj danĝeroj por la animo kaj la sano. Ilia energio an

koraŭ ne estas tiel forta ke ili pasos sen grava difekto, kaj multaj tute perdiĝas.
3e. Se la edzino ne ŝatas elmigri. La faktoj pruvas ke ŝi pro la hejma laboro ne facile alkutimiĝas al la novaj cirkonstancoj. Se ŝi ne povas superi en tiaj cirkonstancoj la tuta familio renkontos gravajn malfacilaĵojn, kiuj malhelpos la rezulton de la afero.
La landoj kiuj nuntempe akceptas enmigrantojn estas Kanado, Aŭstralio, Nov-Zelando Usono, Sud-Afriko, Sud-Ameriko, kaj Francujo
La elmigranto devas havi jenajn karakterecojn:

LABOREMO (ankaŭ en malmolaj cirkonstancoj)
ŜOBREMO (en vivo, manĝo, vestoj amuzo)
ŜPAREMO (por akiri memstarecon)

Li devas prepari sin en jenaj aferoj

1. Scio de la nacia lingvo (franca por Francujo kaj kelkaj provincoj de Kanado, portugala por Brazilo; hispana por la aliaj landoj de Sud-Ameriko kaj angla por la aliaj suprenomitaj landoj)
   Certe li gajnos tuj ĉe la alveno se li povas kompreni la novan labordonanton
2 Ekonomia kaj geografia kono de la nova lando
3. Unua helpo ĉe akcidentoj kaj malsanoj (infannasko!) ĉar la kuracisto ofte loĝas je distanco de centoj da mejloj
4 Naskohelpo ĉe la brutaro kaj brutmalsanoj
5. Mekaniko, ĉarpentado kaj sudrado
6 Religia scio kaj kiel festi en la hejmo la kristanaj festoj, ĉar la religia praktiko estos tute diferenca ol en Eŭropo. Ekz. la patrino devos mem instrui la infanojn en religiaj aferoj!

Speciale en la lastnomita afero la katolikoj havas gravan devon Tiamaniere ili povas kristanigi la novan patrujon Tiamaniere la historio havos sencon! Ĉar la katolikaj irlandanoj suferis persekuton en sia patrujo, ili elmigris al Usono, tiamaniere zorgis ke la katolika religio estas la plej disvastigita el la centoj de la religioj kiujn oni trovas en Usono Estas la tasko de la katolikaj migrantoj klopodi ke la novaj teritorioj estos ne nur materialistaj sed ankaŭ spiritualaj
Ĉu Esperanto povas ludi rolon en ĉi tiu afero?
Laŭ sia senco kaj celo Esperanto devas ludi gravan rolon, tamen ni devas esti realaj kaj rekoni ke nia influo nuntempe ankoraŭ estas tro malgranda
Tamen en unuopaj kazoj ĝi povas plenumi agrablan taskon
Per Esperanto la unuopaj personoj povas prepari sin al la nova hejmo
Per korespondado povas ekesti amikeco kaj interhelpo Speciale el tiu amika korespondado povas rezulti ke la persono en la ricevanta lando helpas la enmigranton en la akirado de loĝejo kiu estas nuntempe ĉie en la mondo la plej grava problemo La amiko povas garantii deĵoron kaj se eble kaj se necese li volas doni financan garantion (ekz kiel Usono postulas)
Dio donu al ĉiuj migrantoj Sian Benon kaj ni esperu ke la postlasitoj en la Malnova Eŭropo eklernu de siaj filoj en diversaj kontinentoj ke estas eble ke diversnaciaj personoj kaj eĉ popolgrupoj kune vivas sen milito en unu interŝtata reglemento por ke ĉe ni kresku unu Eŭropo kaj eble poste niaj familioj renkontiĝos en unu mondfederalismo

# ALDONO

La Centra Oficejo, nomita ĉi supre en la artikolo, malfermiĝis je la 24a de Januaro pasinta, sub la nomo "Internacia Katolika Migrada Komitato" (International Catholic Migration Commission) adreso 9, rue du Prince, GENÈVE (Svisujo).
En letero ricevita pri tiu afero la oficejo skribas: "Ni esperas kunlabori kun via organizo ĝiaj individuaj instancoj kaj reprezentantoj, kiuj havas interesojn en la problemo kiu rilatas la Komitaton."
Kvankam la oficiala lingvo de la Komitato estas la angla ni esperas ke ĝi ne malakceptos Esperanton
La celoj de la Komitato estas.

1 Plifaciligi efikan kunlaboron en la klopodoj de ĉia Katolika Aktiveco rilate al elmigrado, enmigrado, rehejmiĝo kaj servoj al la rifuĝintoj
2 Reprezenti la katolikajn aktivulojn kaj organizojn antaŭ internaciaj organizoj kaj konferencoj kiuj koncernas surplus-popolaciojn, rifuĝintojn aŭ migradon.
3 Kunvoki internaciajn konferencojn de katolikaj grupoj por akiri pli bonajn kunlaboron kaj planon por helpi al migrantoj kaj rifuĝintoj kaj por obteni pli bonan interkompreniĝon inter landoj de elmigrado kaj landoj de enmigrado,
4. Stimuli kaj alkuraĝigi la formadon de katolikaj komitatoj por helpo al migrantoj kaj rifuĝintoj en tiuj landoj kie tia aktiveco estas necesa.
5. Provizi interesajn grupojn kaj organizojn je teknika kaj konsila helpo,
6. Konigi la bezonojn de migrantoj kaj rifuĝintoj
7. Akceli la internacian rekonon kiel rifuĝinton de ĉiuj personoj, kiuj deziras la protekton de ia registaro.
8. Klopodi ke ĉiuj registaroj kaj internaciaj organizoj rekonas la rajton de migrantoj kaj rifuĝintoj je egala spirita kaj religia zorgo.

# KIU ESTIS PASTRO BROWN?

La mondfama angla verkisto G K. Chesterton († 1936) akceptiĝis en la Katolika Eklezio en 1922a Baptis lin monsinjoro John Joseph O'Connor
Unuafoje Chesterton renkontis lin en 1903a En multaj noveloj li priskribas pastron Brown kiel malgrandan larĝvultran simplaniman personon kiu promenas sur la tero de Dio kun malnovmoda pluvombrelo kaj sub la brako pakето volvita en bruna papero
Tiu portreto tute konfirmiĝas al pastro monsinjoro O'Connor kiu dum 32 jaroj estis paroĥestro en Bradford
Aŭ ĉu monsinjoro O'Connor alprenis la kutimojn de la figuro kreita de lia amata konvertito?
Monsinjoro O'Connor neis poste ke li posedus specialajn detektivajn ecojn tamen li deklaris ke li dufoje estis en direkta kontakto kun murdoj kiuj neniam estis rekonitaj tiaj
Monsinjoro O'Connor mortis je la 5a de Februaro pasinta en la hospitalo de Leeds
Dekdu el la detektivaj noveloj de Chesterton vi povas trovi (kaj certe vi devas legi ilin) en la esperanta traduko "LA NAIVECO DE PASTRO BROWN"
Mendu ĝin ĉe "Espero Katolika" Vleuten Nederlando ($f$ 3,10 + $f$ 0.25) aŭ ĉe niaj reprezentantoj
Por Nederlando ĉe Libroservo de N.K. Kasperspad 91 Dordrecht
Poŝtkonto 214009 de f-ino T Durenkamp. ($f$ 3 10 + $f$ 0.15)
La libro estas en bela bindo

# OPINIOJ DE GEORGES BERNANOS PRI KRISTANO KAJ KRISTANISMO

Kristano, kiu Kriston ne vivas, ankaŭ kiel homo malleviĝas ĝis nenio; la neimagebla donaco, kiun ni ricvis sen ia merito, sekvigas post si tiel teruran devigon, ke perfido pri tiu donaco lasas nin malleviĝi ĝis sub la homoj ĉi utagaj nin faras monstroj en la origina senco de l'esprimo. Se la kristanoj posedus pli profundan konvinkon pri tiu ĉi vero, tiam ili apenaŭ povus plu malŝati la senkredulojn kaj la homaron entute, laŭ bonaj kaj malbonaj sin mem ja kalkuli inter tiuj. Ili komprenus ke ĝuste tiu ĉi eksterordinara privilegio malpermesas al ili fari sin juĝistoj de tiuj al kiuj ĝi ne estas donita pro ja nur ŝajna, sed tamen doloriga maljusto. Ĉefe ili evitus ĉi tiujn malprivilegiitajn fratojn ekstermi per maŝinpafiloj por tiel honori Dion kaj konsoli la krucumiton.

* * *

Ne estas la granda mizero de tiu ĉi mondo ke ekzistas sendiuloj sed, ke ni estas kristanoj tre mezvaloraj. Mi ja timas ĉiam plie ke ni pereigadas la mondon ke ni provokados fajron el ĉielo. Kiel freneze, pro nia pravigo fanfaroni per tio, ke ni posedas la perfektan vivigan, liberigan kaj savan veron kvankam ĝi estas senefika en niaj manoj!
Kiel stulte kuŝi malantaŭ tranĉeo de defendo el rezignoj kaj malpermesoj kvazaŭ ni ne povus fari pli bonan, ol la leĝon konservi, kvankam nature kaj supernature ni estas vokitaj ĝin plenumi.
Laŭdire la eklezio estas la plej granda potenco konserva de l'historio. Ĉi tiun bildon de la eklezio de Dio oni faris al si jam depost la tempo antikva. Sed ni scias, ke ĉi tiu bildo estas ne ĝusta, sed bedaŭrinde ni scias ankaŭ, ke multe da kristanoj ripozadas en tiu ĉi bildo ili emas kredi, ke Kristo mortis por la sekureco de la bienuloj, por la reputacio de altrangaj oficistoj kaj por la daŭro de registaroj.

* * *

Kristanoj! La nuntempa stato de la mondo estas honto nia. Ni plendadas, ke mankas al ni la homoj, vere ni mankas al la homoj. Anstataŭ pro kortuŝo de sentemaj animoj anoncadi per voĉo tremanta, ke la fortoj de la malbono ĉie venkas, ke la idolismo reviviĝas, ni preferu humile konfesi, ke nia tranĉeo ne sukcese defendiĝis, ke ni lasis frakasiĝi la fronto de la kristanaro.

* * *

La kristanismo ne estas unue komplika sistemo de malpermesoj kaj limigoj. Bonaj pensoj estas la plej bona rimedo kontraŭ malbonaj kaj la disiĝo de la 'MI' per artifika spirita gimnastiko tre malfacile atingebla, tuj sukcesos por tiu, kiu sin donacas al la kunhomoj.
La inklino al la malriĉo neniam mankos al tiuj kiuj amas la malriĉulojn, ilin amas pro ili mem kaj ne pro ia profito spirituala, kiun ili esperas tiri el la almozo, ĉar fine Dio postulas de mi ke ni honoru kaj servu ilin sed ne pro ili nin honori kaj servi.

El 'Revue des Jeunes', laŭ d-ro I. Keckeis
en 'Die Österreichische Furche'
Trad. d-ro A.H.

---

**LA BENO** Iam, Don Bosco vizitis kardinalon De Angelis kaj ĝuste kiam li adiaŭis, la prelato genuiĝis ĉe liaj piedoj kaj demandis al li la benon.
'Ho', ekkriis mirite Don Bosco, 'ĉu mi mizera pastro devus beni vin, Kardinalo? Konvenus ke vi, benu min.'
'Se estas tiel' diris la kardinalo, 'restas nur al mi konservi tiun monujon kiun mi volis donaci al vi por viaj Kariatjoj kontraŭ unu beno.' Don Bosco restas iom perpleksa poste, li diris 'Via Kardinala Moŝto vi ne bezonas mian benon, sed mi bezonas vian monujon' estos pli bone ke mi benu vin.'

# USONO, LA FANDUJO DE LA POPOLOJ

Tiel oni ofte nomas la landon de la Unuiĝintaj Ŝtatoj de Nord-Ameriko. Kaj verŝajne ne ekzistas alia lando kun tiom da diferencaj popolgrupoj En la 17a jarcento la koloniistoj ekloĝis tie kaj poste el ĉiuj landoj de Eŭropo venis la enmigrantoj
La diferenco inter la grupoj tre klare montriĝas sur la religia tereno Oni trovas en Usono Anglikanojn Skotajn Presbiterianojn Germanajn Pietistojn Francajn Hugenotojn Katolikojn el Irlando kaj Italujo kaj la lando estas kvazaŭ libro kun specimenoj de ĉiuj religioj de Eŭropo
Kompreneble la religia diferenco en la komenco estis kaŭzo de konfliktoj, eĉ de veraj bataloj Kaj tiel okazis ke en Boston kvar Kvakeranoj estis mort pendigitaj, kvankam ili estas la solaj viktimoj de amerikaj religiaj kvereloj.
Kiel lando sen tradicio do sen malamo kaj malbonaj sentimentoj Ameriko baldaŭ superis la religian batalon Jam en 1789 la Federala Konstitucio de la Liberaj Unuiĝintaj Ŝtatoj proklamis la kompletan liberecon de religio Ĉiuj ŝtatoficoj estas atingeblaj por ĉiu nekonsidere ties religion
En aparta amendamento estis mal er mesita por ĉiam proklami Ŝtatan Religion. Tiamaniere ĝis la hodiaŭa tago ekzistas en Usono kompleta apartigo de Eklezio kaj Ŝtato
La eklezioj estas nur liberaj unuiĝoj de unuopaj burĝoj Nenia eklezio ricevas ŝtatan subvencion kaj laŭtekste en neniu ŝtata lernejo oni povas instrui religion Tamen iom post iom en ĉi tiu lasta punkto oni estas pli larĝanima
Aliflanke la eklezioj ne pagas imposton por ĉio kio servas al la kulto kaj la instruo Oficiale la dimanĉo estas ripoztago kaj blasfemanto estas severe punata
Kiam ni hodiaŭ trarigardas la staton de la diversaj religioj ni povas nombri ne malpli ol ducent sesdek ekleziajn grupojn En 1800 nur 10% el la enloĝantaro estis membro de ia eklezio Nuntempe 50% estas eklezianoj
La katolika eklezio estas la plej multnombra kaj plej grava grupo Ĝi nombras 27 610.000 kredantojn de la 140 000 000 enloĝantoj Do ĉirkaŭ 20%
De post 1926 tio signifas gajnon de 48% Ĉi tiu pligrandiĝo ne nur estas kaŭze de interna disvastiĝo sed ankaŭ pro la enmigrado de katolikaj germanoj italoj kaj irlandanoj Kaj la Katolika Eklezio ĉiam pligrandiĝas
Krom la Katolika Eklezio la sekvantaj protestantaj eklezioj estas en USONO Baptistoj 11 400.000 dividitaj en 19 sektoj Metodistoj 8 762 000 ankaŭ en 19 sektoj Luteranoj 5 000 000 dividitaj en 20 sektoj Presbiterianoj 2 400 000 en 10 sektoj Episkopalistoj (branĉo de la anglikana eklezio) 2 540 000 la Disĉiploj de Kristo (sekto de la presbiterianoj) 1 700 000 Kongregacionalistoj 1 100 000.
Ĉiuj ĉi tiuj protestantaj eklezioj nombras entute 32 902 000 kredantojn Tre interesa estas ke la kvindek grandaj amerikaj eklezioj kune formas 97% de la kredantaj amerikanoj Al tiuj ankaŭ apartenas la judoj (5.000 000) kaj la diversaj ortodoksaj (disigitaj de la katolika eklezio) eklezioj (1 200 000)
La restanta 3% de la kredantoj en Ameriko apartenas al ducent dek eklezioj kaj religiaj sektoj Ili formas miksaĵon de plej diversaj kaj diferencaj religiaj sentimentoj
Nenie en la mondo la sektiĝo pli fekunde floras
La juna popolo de Usono kiu serĉas kaj klopodas formi tradicion, kulturon kaj civilizacion ankaŭ palpante serĉas religion kiu povas kontentigi ĝin komplete Ekzistas granda entuziasmo kaj ni ĝoje konstatas infana sincereco por multaj eblecoj
Ni esperu ke ĉiuj trovu la vojon al la vera Eklezio de Kristo kie certe ili trovos grandan spiritan forton por sukcese ludi la gvidantan rolon kiu Usono nuntempe okupas en la materia sfero

J.

# ANTAŬDIRO DE ADEPTO

Petro Josefo PROUDHON (15.7.1809 19.1.1865) estis decidiga socialisto kaj anarĥiano en Francujo, unu el la plej elstaraj dialektikistoj Li elparolis la aserton· 'Propraĵo estas stelaĵo.'
Tamen baldaŭ li fariĝis la plej energia kontraŭulo de la komunismo
Tiam li deklaris.
'La socia revolucio povas nur konduki al giganta ŝanĝo, kies senpera sekvo estus malfekundigi la teron jungi la socion per jupo por frenezuloj Kaj se estus eble ke tia stato daŭras nur kelkajn semajnojn, ho, tiam vi scius kion socia revolucio signifas amason senkatenitan, armitan, ebrian pro venĝemo kaj rabio, pikstangojn, hakilojn, elingitajn sabrojn, tranĉilojn kaj martelojn· la urbon malgajan kaj malparoleman la policon ĉe la fajrujo de la familio; la opiniojn suspektajn la vortojn subaŭskultatajn, la larmojn observatajn la ĝemojn nombratajn; la silentadon spionitan, spionadojn kaj denuncojn neporteblajn rekviradojn ĉiam pli ampleksajn monpruntigojn, de valorigitan papermonon; internan militon kaj la eksterlandon ĉe la limoj; senindulgajn prokonsulojn, komitaton por bonfarto., plej superan komitaton kun feraj koroj.
Jen la fruktoj de tiel nomita revolucio socio Kun ĉiuj miaj fortoj mi sentas abomenon pro la komunismo ĉar ĝi estas malkapabla, senmorala, taŭga sole, por estigi trompatulojn kaj friponojn.
Ĉi tion mi deklaras vidante ĉi tiun kaŝatan propagandon, ĉi tiun senhontan malprudecon, ĉi tiun senmoralan filiteraturon, ĉi tiun almozulecon, ĉi tiun malsagacon de la menso kaj koro, kiuj komencas kapti parton de niaj laboristoj Mi estas pura de komunistaj frenezoj '

El 'Der Volksbote', Innsbruck

Dr. A H.

# VATIKANAJ SCIIGOJ

Okaze de la XV jarcento de la Ekumenika (universala) Koncilio de Kalcedonio kies plej valoraj fruktoj estis la fina klarigo de Kristologia terminaro kaj la certigo de la aŭtoritateco kaj supereco de la Roma Pontifiko super la tuta Eklezio—la datreveno estis solenigita en la plej gravaj ekleziaj provincoj laŭ la deziro esprimita de Lia Papa Moŝto Pio XII en la encikliko Sempiternus Rex' de la pasinta oktobro.
Apartan solenecon atingis la rememorigoj en Venecio ĉe la pregejo S.Zakario, pere de konferencoj konfiditaj al teologiistoj kaj historiistoj, kaj en Torino per alta parolado de prof Stefano Maggio ĉe la Pontifika Salesana Ateneo.

---

Du junaj monakinoj de la 'Sanktega Koro forveturis aervoje el Alĝeri por fondi 'fratecan domon' en Tamanrasset en plena centro de Sahara dezerto La du kuraĝaj monakinoj estas la unuaj kiuj iras restadi (prenas sidejon)en la samaj lokoj kie la fama Patro De Foucauld' pasigis la lastajn jarojn de sia vivo kaj li mortis viktimo de sia sindono al la saharanoj.

---

La nombro de la katolikoj en Anglujo pligrandiĝis dum unu jaro je pli ol 450.000 unuoj 335'000 el ili apartenas al la dioceso de Westminster

---

En Japanujo ekzistas nun 106 katolikaj lernejoj kun pli ol 45 mil lernantoj kaj precize 5 universitatoj 6 kolegioj pretigantaj al universitato 59 superaj kaj mezgradaj 25 unuagradaj kaj 11 specialaj lernejoj
La instruistaro konsistas el 203 sacerdotoj 486 monakinoj kaj 2091 laikuloj

# SUKCESOJ DE LA MOVADO !!!

Regule publikigas Esperanto-rubrikojn la tri sekvantaj katolikaj junularaj gazetoj en Nederlando Crescendo por la knabinoj de la Liceo en Lejdeno, De Engelbewaarder (La Gardanĝelo) por geknaboj de katolikaj popol-lernejoj De Gouden Wiek (La Ora Flugilo) por geknaboj en duagradaj lernejoj

---

Aperis novaj turismaj reklamiloj en Esperanto pri Bamberg (Germanujo) Stirio (GRAZ Aŭstrujo) Itala Turisma Klubo (Milano Italujo) Hungarujo kaj la Hungara Provinco ( Ibusz Budapest V)

---

La katolikoj en Gemert (Nederlando) intencas konstruigi monumenton honore al pastro L J M M. Poell kiu mortis en januaro 1939 Sac Poell estis unu el la fondintoj de Nederlanda Katoliko kaj ankaŭ de I K U E

---

Unu el la libroj de mons Akira Ogihara de Hiroŝima (Japanujo)estas tradukita en Esperanto Dum vizito al Bolzano (Italujo) mons Promesis helpi al la disvastigo de nia lingvo

---

Pro liaj multaj meritoj rilate la karavanojn el Nederlando dum la S ta Jaro 1950 al Romo Lia Papa Moŝto nomis paroĥestron Hub J A M Eras el Vught (Nederlando) Sekreta Ĉambelano de la Papa Korto.
Danke ni memoras liajn helpojn dum nia Roma Kongreso
Elkore ni gratulas lin je tiu distingo

---

Dum la 24-Jara Konferenco de la Katolika Asocio por Internacia Paco en Nov Jorko (Usono) 10 11 novembro 1951 sac John La Farge S J atentigis je la grava intereso de Esperanto por la celo
D ro Solzbacher paroladis pri la temo kaj speciale emfazis la petskribon ĉe la UNESCO

---

Wagons-Lits Cook mondfama organizanto de la dorm kaj restoracivagonoj en internaciaj vagonaroj publikigos la menuon ankaŭ en Esperanto

---

L'Osservatore Romano (Vatikana jurnalo) publikigis en sia numero de 23 XI 51 detalan artikolon pri Esperanto kaj Papo Pio X Verkis ĝin sac G M Roschini rektoro O S M

---

Antaŭ tri jaroj okazis en Svedujo internacia kurso pri Sveda socia strukturo Nunjare 27/7-2/8 okazos kurso pri La nuntempa Svedlando en la alt lernejo Bohusgarden apud Gotenburgo La registaro subvencias la kurson La kostoj estos 75 sv kronoj

---

U E A fondis Centro de Esploroj kaj Dokumentado en 300 West End Lane London N.W.6 Ĝi celas sciencajn esplorojn pri la Internacia Lingvo kaj ties diversaj flankoj. i a baldaŭ okazos esploro pri la ekonomia stato de la esperantistoj Alia branĉo estos la Dokumentado
Tria branĉo la informado speciale al oficialaj institucioj kiel Uno kaj Unesco, registaroj ktp

# DANKON SED NE. ADIAŬON!!

En ĉi tiu numero vi povas legi ke nia altŝatata redaktoro s-ro Leideritz devas rezigni al la laboro Atendante la decidon de la estraro de I K U E mi prenas denove sur mi la taskon de redaktoro Nome de nia estraro ni dankas la eksredaktoron pro liaj multaj klopodoj kaj oferoj por nia kara movado Tamen ni esperas ke li de tempo al tempo povos kunhelpi per altnivela artikolo. Ĉi tiu numero estas 12-paĝa anstataŭ 8-paĝa. Tio estas ĉar ni venonte klopodos eliri precize je la unua de ĉiu monato Do certe ĝi ne estas perdo por niaj abonantoj Tamen 12-paĝa revuo ne estos la regulo almenaŭ ne se la abonantaro ne kreskos je 50% Ofte okazas ke kunlaborantoj tradukas artikolojn el naciaj revuoj kaj poste spertas ke ili ne aperas en E K. Vi povas eviti tion

se vi unue sendas al mi la nacian tekston por priju$\hat{g}$i $\hat{c}$u la temo estas inte resa por niaj legantoj Laŭ mi estas la tasko de la redaktoro zorgi ke la en havo akordiĝas kun la intereso kaj la gusto de la plej granda parto de la fidelaj legantoj El persona vidpunkto oni facile eraras

L G C de Jong

## PROGRAMO DE RADIO ROMA EN MARTO 1952

| | | |
|---|---|---|
| Merkredo | la 5an | Italaj urboj Cremona (Prof Blasimme) |
| Vendredo | la 7an | Respondoj al la radio aŭskultantoj (Prof Mus |
| Merkredo | la 12an | Italaj komponistoj Gerolamo Frescobaldi (1583 1644) (Prof Blasimme) |
| Vendredo | la 14an | Komento pri la XXIX kanto de la Infero de Dante Alighieri (Prof Musella) |
| Merkredo | la 19an | Petrarca kaj lia kontraŭstarita amo (Prof Blasimme) |
| Vendredo | la 21an | Itala literaturo XIV jarcento Giovanni Boccaccio (Prof Musella) |
| Merkredo | la 26an | Programo por la geknaboj. PINOKJO IV sceno |
| Vendredo | la 28an | Komento pri la XXX kanto de la Infero de Dante Alighieri (Prof Musella) |

Horoj 18 30 18 50 (M E )
Ondolongo 25 21 31 35 49,92 m

LA ESPERANTA VOĈO
A BLASIMME
Via Veneto 56
Roma (Italujo)




Josef Biewer sac Darmstadt (Germanujo)

P.J Heinle Clarkdale (Usono)

G. Pausback sac Chicago (Usono)



# Korespondado

Ek de la nuna numero la revuo publikigos anoncojn pri korespondado La tarifo por la abonantoj estos 1 Int rkp Ni devas limigi a tekston je du linioj. Provizore ni publikigos en ĉiu numero maksimume 10 adresojn laŭvice de la al veno ĉe la administracio
Por neabonantoj la tarifo estas 2 Int rkp Nepagitajn anoncojn ni rifuzos Je la sama tarifo oni povas uzi la korespondservon de s ro H.Stahl Pestaloz zistr 4/I. (13a) WEIDEN (Oberpf ) Germanujo

s ro M Ronsmans 165 Chaussee de Wavre IXELLES, Belgujo ŝanĝas librojn ĉiu lingvajn pri iluziismo, ridindaĵoj, farmakopeo, medikamentaj receptaro ktp.

Boekhandel-Offsetdrukkerij "Elinkwijk"
Amsterdamsestraatweg 480-482
Utrecht Telefoon 10757

 'E.K.